

NIA VOĈO  
Madrída Esperanto-Liceo  
San Alejandro 6-4<sup>o</sup>B-Ext. 28005 Madrid  
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

FEBRUARO 2001

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:

<http://www.ciudadfutura.com/esperanto>

#### ĜENERALA KUNVENO DE MEL

En aparta folio ni inkludas la protokolon de la Ĝenerala Kunveno de nia asocio kiu okazis la 29an de januaro. La Estraro reelektita estas jena por la periodo 2001-2004:

Prezidantino:	Carmen Suárez Fernández-Cid
Sekretariino:	Guadalupe Sanz Bueno
Kasisto:	José Franciso Platas
Vokalo 1:	Juan A: del Castillo Martónez
Vokalo 2:	Angelita Sanz Mayor

#### ZAMENHOFA BANKEDO

Anstataŭ en decembro oni celebris la Zamenhofan bankedon en januaro. La kialo de la ŝanĝo de la dato estis "ĉar en decembro ĉiuj havas amason da bankedoj". 34 geesperantistoj kaj gesimpatiantoj partoprenis en la festo, inter ili la valencianoj Augusto kaj Alicia kaj Pedro Garrote el Valladolido. Lucrecia San Antonio, la plej aĝa (89) faris kaj deklamis poemon.

#### LORCA EN LA UNIVERSITATO

En la recenzo kiun faras Petro Baŭn (Esperanto 2001-01), profesia hispanisto en usona universitato, pri la libro "Sur la spuroj de F. García Lorca", Miguel Fernández. U. de Santiago de C.1996, li diras ke li uzas ĝin kiel lernotekston en sia universitata kurso pri moderna hispana literuro.

#### ESPERANTO EN AMASKOMUNIKILOJ

La ĵurnalo "El Norte de Castilla" (2000-11-18) publikigis en ĝia suplemento Focus artikolon en kiu amplekse mencias esperanton.

La radio "France Bleue" en ĝia programo pri Okcitana regiono kaj Katalunio elsendis, okaze de la Zamenhofa Festo, koncerton en kiu partoprenis la bando Kaj Tiel Plu. Invititoj estis Ricardo Cash kaj Floreal Martorell.

Tonyo del Barrio partoprenis en la TV5-programo "50x15" kaj en la raporteton por presenti sin li menciis sian esperantistecon profitante la okazon por gratuli la novan jarcenton en Esperanto.

La revuo "Perfiles", eldonita de ONCE, denove (decembro-2000) anoncas la esperanto-kurson, kiun havas en sia TTT-paĝo Andaluzia Esperanto Unuiĝo.

#### KOTIZO POR 2001

La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj ok jaroj. Bv. se vi ankoraŭ ne abonis ĝin sendi ĉekon po 2.250 pesetojn, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭ-dankon pro via kontribuo al daŭrigado de MEL. Vi povas pagi rekte al la kasisto en nia kunveno, (lunde vespere en Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7) aŭ per banko al jena konto:

Banco Atlántico: 0008/0110/97/1120404200



## 2001 Eŭropa Jaro pri Lingvoj

### EŬROPA UNUIĜO

Claude Longue Epée prenis la torĉon de Germain Pirlot en la aktivado ĉe Eŭropa-Unio. Li estas estrarano de Franca Unio pri Esperanto kaj komitatano de Eŭropa Esperanto-Unio. Li daŭrigos la Pirlotan strategion: informi eŭrodeputitojn pri ĉio koncernanta esperanton. Pri ĝiaj karakterizoj de komunikilo, de lingva propedeŭtiko, de ilo por interkomunikado kaj por paco.

### HISPANIO

60a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO San Javier (Murcia), 22a gxis 30a de junio 2001  
 Kongresejo: Centro Cívico de San Javier Parque Almansa. Kongresa Sekretario: Vicente Sánchez Lumbreras. Saturno 15. ES-30730 San Javier (Murcia). Tel: 968192598; 968191243; 968183338; 968190588. Retadreso: [vsal0001@almez.pntic.mec.es](mailto:vsal0001@almez.pntic.mec.es)  
 KOTIZO: Kongreskotizoj en pesetoj: ĝis la 30a de Aprilo: 5.000 Poste: 5.500  
 Kotizu pere de BBVA, konto-numero: 0182-3203-57-0200015978; al la 60a Hispana Esperanto-Kongreso; ES-30730 San Javier (Murcia). Kunsendu la pagpruvilon kaj la aliĝilon al la suba adreso. Por bankĉekoj kaj poŝtmandatoj aldonu 10% La kotizo estas ne repagebla.

De marto ĝis junio estos esperanta kurso en la Vaska Universitato, oficiale agnoskita kiel studobjekto, kun akademia valoro de 4,5 "kreditoj" (45 horoj).

Eldonota de Korea Esperanto Asocio aperos en la Zagreba-UK, la verko "Esperanto en la 21-a jarcento". Giordano Moya kunlaboros pere de artikolo "Interna ideo de esperanto en la 21-a jarcento".

### ESPERANTO EN INTERRETO

Jen kelkaj interesaj retpaĝoj:

Memoru ke la revuo "El Popola Ĉinio" jam ne aperas en papero vi povas legi ĉe [www.chinareport.com.cn](http://www.chinareport.com.cn)

Aliaj revuoj: "Esperantisto Slovaka" [www.home.sk/www/esperant/es.htm](http://www.home.sk/www/esperant/es.htm). "Eventoj": [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu)

Astronomia Esperanto-Klubo: [www.esperanto.org/AEK](http://www.esperanto.org/AEK)

Dissendolisto por lernantoj: [www.egroups.com/group/curso-de-esperanto](http://www.egroups.com/group/curso-de-esperanto)

.....

### ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4<sup>B</sup>. Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal